

BJELOVARAJ ESPERANTISTOJ DUM LA JARO 2018

Kiel ĉiujare, ankaŭ en la jaro 2019, mi utilgis la ŝancon partopreni du elstare preparitajn aranĝojn de Bjelovara Esperantista Societo.

La unua el ili estis la jubilea 20-a ALP-ADRIA ESPERANTO-KONFERENCO okazinta inter la 8-a kaj 10-a de junio 2018. Temas pri la aranĝo kiun organizas alp-adriaj esperantistoj ekde la jaro 1989 (Arnoldstein, Aŭstrio). Bjelovara Esperantista Societo kandidatiĝis gastigi ĝin dum la pasintjara 19-a konferenco en Brežice (Slovenio) kaj per la sukcesa realigo ĝi pravigis la ricevitan komision. Menciendas ke la Konferenco okazis enkadre de la festado de Tago de la Departemento Bjelovar-Bilogora, kiu estis ĝia oficiala aŭspicianto. Dum la malferma ceremonio la ĉeestantojn alparolis la departementestro Damir Bajs, la urba reprezentanto Ivica Vrhovnik kaj la sekretariino de la Esperanto-Rondo de Alp-Adrio Edvige Ackerman el Triesto (Italio), kaj estis legita salutletero de Radimir Čačić, la estro de la Varaždina departemento, kiu estas aktuala prezidanto de Alp-Adria Alianco.

La laboran parton de la aranĝo oni dediĉis al la temoj *Alp-Adrio kaj Danubio* kaj *Publikaj rilatoj de esperantistoj kun neesperantistaj medioj* dum kiuj la prelegantoj el Aŭstrio, Hungario, Italio, Kroatio kaj Slovenio prezentis ses temoj kiujn sekvis interesa diskuto kun multaj ideoj. En paŭzoj inter la prelegoj la partoprenantojn muzike amuzis Marta Čuković, la lernantino de la bjelovara Muziklernejo *Vatroslav Lisinski*. Post tiuj prelegoj okazis la asemblea kunsido de alp-adriaj esperantistoj, dum kiu oni diskutis pri plujaj direktoj de ilia laboro kaj diskonigis konkurson por gastiganto de la 21-a konferenco. Estis akceptita rezolucio, sendota al reprezentantoj de Alp-Adria Alianco en la ŝtatoj-membroj.

Estis ankoraŭ pluraj programeroj, sed min aparte impresis plantado de Arbo de internacia amikeco kiun financis la Urbo Bjelovar. Ĝi estis plantita en vere simbola loko, ĉe la Placo de Stjepan Radić, persono kiu apartenis al maloftaj politikistoj de sia epoko, estante ankaŭ esperantisto, ĝuste en la periodo kiam li estis ministro de edukado.

La dua aranĝo kiun mi ĉeestis okazis la 22-an kaj 23-an de septembro 2018, kiel parto de Tago de la urbo kaj Tago de bjelovaraj defendantoj, en la Popola biblioteko *Petar Preradović* Bjelovar. Temas pri la jam sesan fojon organizita renkontiĝo „Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo“. Mi persone ĉeestis la aranĝon nur la 23-an de septembro (dimanĉo) kune kun multaj zagrebaj esperantistoj kiuj trajne veturis frumatene el Zagrebo al Bjelovar. Ankaŭ ĉi jare, kiel parto de la programo, estis organizita la 6-a Deklamkonkurso, dum kiu la partoprenantoj deklamis originalan Esperantan poezion kaj poezion tradukitan al Esperanto.

Enkonduke al la festado de la 110-jara datreveno de Esperanto en Bjelovar, kiun oni festos en 2019, la ĉefa temo de la ĉi jara aranĝo estis la ronda tablo „Kontribuo de esperantistoj al la kultura progreso de Bjelovar tra la historio“, dum kiu estis prezentitaj faktoj pri kelkaj plej konataj esperantistoj de Bjelovar: Fran Kolar Krom, Ivan Barešić, Vilim Polašek, Dragutin Štokić kaj Željko Sabol.

En la vestiblo de la biblioteko estis organizita ekspozicio pri la plej konataj bjelovaraj esperantistoj kaj ekspozicio de insignoj, kiujn dum sia vivo kolektis antaŭnelonge forpasinta Nikola Golić, membro de Bjelovara Esperantista Societo.

La partoprenantojn de la aranĝo pere de video-mesaĝo salutis konata bjelovara verkisto Goran Tribuson, kies romanon „Fruaj tagoj“ esperantigis Josip Pleadin kaj la libron prezentis profesoro Zdravko Seleš.

Post la komuna fotado la kunvenintoj vizitis la Arbon de internacia amikeco, kiun plantis la partoprenintoj de la ĉi jara 20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco.

Konklude mi diru ke Bjelovara Esperantista Societo en la jaro 2018 montris kiel oni bezonas kunlabori kun gravaj personoj el politika vivo kaj tiamaniere tre sukcese organizi aranĝojn kiujn jaron post jaro vizitas ĉiam pli da kroataj kaj eksterlandaj esperantistoj.

Fine mi povas informi vin ke bjelovaraj esperantistoj jam nun preparas la sepan renkontiĝon „Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo“ kiu okazos inter la 20-a kaj 22-a de septembro 2019, ĉi-foje festante la 110-an datrevenon de Esperanto en Bjelovar. Inter aliaj programeroj oni antaŭvidas por ĉiuj kiuj tion deziras, viziton de Dokumenta Esperanto Centro (DEC) en Đurđevac kun kiu Bjelovara Esperantista Societo (BES) dum jaroj intense kunlaboras. Nome, DEC jam 40 jaroj funkcias kiel nacia Esperanto-arkivo de Kroatio, sed en privata domo de esperantisto Josip Pleadin. Antaŭ unu jaro oni komencis konstrui apartan domon por tiu celo. Dank' al enlandaj kaj eksterlandaj donacintoj, dum 2018 estis finita la dua fazo de la konstruado de tiu domo, kiu disponos pri 150 kvadratmetroj da spaco.

Anto Mlinar